

& Lilka balado:

< Originala ripete 23 sed rekante 9 el 37 batoj por strofo, entute 962 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid (2016). Alternativaj melodio kaj rekantaĵo estas tiuj de Vilmunda balado, Norda Kantaro #4405, rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 884 paŝoj dum 10 minutoj.>

(#Melodio:

(#Originala: <:37>

/(mimi soso soso somi; rere doTi LaLa;)×2

(mimi miTi dodo doLa; SoSo doTi LaLa;)×2

(#Rekantaĵe: mimi miTi dodo TiLa So SoSo LalTi do o)

)?

(#Vilmunda: <:34> /fami sofa fami mi;re rere dore mimi; miimimi fami fami faso; sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e)

)×26)+

(&Strofoj:

'1 (&Originala:

/("Kara Lilka", diris patro, venos tuj milito. ;)×
(Por plorego kaj cikatro estas ĝi invito. ;)×

(×:; **Ke la tagoj de l' homaro estu pli lu2maj.**))

?

(&Vilmunda:

"/Kara Lilka", diris patro, venos tuj milito.
(×:;) Por plorego kaj cikatro estas ĝi invito.

(×:; **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Ŝatas drakoj ŝpruci fajron, hejmojn forbruligi. Devas ili por salajro morton, ho, instigi."

'3 Lilka diris al la drako ; "Nian hejmon ŝparu Donos mi al vi la brakon ; ne malbonon faru."

'4 Drako ŝin respondis akre ; "Ni rilaton rompos. Per militaj brilparadoj ; mi armile pompos."

'5 Lilka petis al la drako ; "Tamen vivojn lasu. Niajn domojn kaj kunhomojn ; bombe ne frakasu." ;

'6 Drako spiras fajrajn bombojn ; kaj granatoj krevas. "Sed ni estas malamikoj, ; mi malami devas." ;

'7 Fajre pafe, pacon trafe ; drako ŝin minacas. "Pacon pledi, gracon cedi ; kiel vi aŭdacas?" ;

'8 "Ho mia filino kara, ogrojn tre atentu. ke fervoron porhomaran vi ne poste pentu!"

'9 Lilka petas al patrino ; ke ŝi staru firme. Ŝi rigardas la filinon por protekti ŝirme.

'10 Lilka dormas en la domo ; pordon ogro frapas. Ogro doman pordon frapas kaj per ungoj skrapas.

'11 Monton regas ogro, li sur ; Lilka pordo frapas. La najbaroj time kaj sen;move bruon gapas. ;

'12 Ogro Lilkan alparolas ; "Fi, vi estas judo. Mian malamegon gregan ; mi sur vin altrudos." ;

13 Lilka diris al elfino ; "Via penso klaras. Inter pastroj kaj pilastroj ; kredo vasta staras." ;

'14 E2lfino respondas "Bone ; venu nin renkonti. Inter dioj provas ni ; per unu sama ponti." ;

'15 "Viajn vortojn en la mondo;lingvon mi tradukos kaj el ĝi plej belajn pensajn ; perlojn mi elplukos." ;

'16 "Tiujn perlojn do vi montru ; al miaj infanoj. Venu vi al Agla Monto ; trans la oceanoj." ;

'17 Lilka venis aglan monton ; trans la oceanoj. Tie perlojn ŝi instruis ; al elfininfanoj.

'18 Aglo super monto sia ; soras, Lilkan vidas. Ŝin esplori, ĉu laboris, ; fluge li rapidas. ;

'19 "Ĉu vi nestos, longe restos ; jen sur mia monto? Mi decidis, kaj ne fidis ; novan enmigronton." ;

'20 "Mi al la elfidoj montras ; brile perlajn vortojn. Ogro trans la maro rabas ; for de ni la fortojn." ;

'21 "Nu, vi rajtas al elfidoj ; diri belrakonton. Sed vi ne ekloĝu mem sur ; mian aglan monton." ;

'22 "Vidas mi ke vi por nesto ; branĉojn jam kolektas. Tial mi postulas ke vi ; for de ni direktas." ;

'23 Al la hejma ogra monto ; Lilka do revenas pro ogridoj jam amikoj ; ŝiaj tre ĉagrenas

'24 Lilka pledas al ogridoj ; sed ili respondas "Nigran la hararon vian ; baldaŭ ni fortondas"

'25 Homojn kaj la elfojn la ogridoj tuj forportos "Iros vi en groton nian ; kaj vi ĉiuj mortos."

'26 Fine en la ogran groton ; ĉiuj devas iri Tie pro sufoka fumo ; oni ĉesas spiri)

